WIKIPEDIA

Judhispana lingvo

La **judhispana lingvo** estas varianto de la iberaj latinidaj lingvoj parolata de la sefardaj judoj. Aliaj nomoj estas: **sefarda lingvo**, **Ladino** (לאדינו) (sed oni ne konfuzu ĝin kun la ladina, varianto de la romanĉa lingvo), **Judezmo** (aŭ *Ĝudezmo*) aŭ ankaŭ **Ĝudeo-Espanyol** (גֻוּדֵיאוֹ־אֶיסְפַאנְיוֹל). La sefarda lingvo devenas el la malnova kastilia lingvo kaj estas parenca kun la hispana kaj portugala lingvoj.

Kiam la judoj estis eelpelitaj el Hispanio en 1492, ili elmigris en Nord-Afrikon kaj Osmanan Imperion. Parolinte origine la hispanan lingvon, la judoj tiam evoluigis sian lingvon aŭtonome, pliriĉigante ĝin per hebreaj vortoj el la precipe religia fako kaj vortoj de la ĉirkaŭa lingvo por la ĉiutaga uzado. La judhispana lingvo estas hodiaŭ precipe parolata en Israelo de centmil parolantoj tieaj, kun rapide malkreskanta lingvanaro.

Hodiaŭ oni uzas preskaŭ nur la latinan alfabeton, sed ekzistas ankaŭ skribsistemoj kun la hebrea kaj tre malofte la greka alfabeto. Ekzistas literaturo kaj riĉa muzika tradicio, ne nur populara. Diversaj muzikistoj kaj kantistoj el ĵazo kaj popo provas revivigi la judhispanan lingvon pere de sia muziko. La lingvo staras sur la listo de la endanĝerigitaj lingvoj de la UNESKO.

Judhispana lingvo	
Ladino - לאדינו	
Parolata en	Israelo, Nord-Afriko kaj Turkio
Parolantoj	137 000
Denaskaj parolantoj	proksimume 150.000
Skribo	latina kun kelkaj aldonoj
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Italika	
Latinida	
Ibero-latinida	
Judhispana	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	*ne havas oficialan statuson*
Reguligita de	Autoridad Nasionala del Ladino
Lingva statuso	4 severe endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	lad
ISO 639-3	lad
Glottolog	ladi1251
Angla nomo	Ladino
Franca nomo	judéo-espagnol
Vikipedio	

Enhavo

Historio

Komparo kun aliaj lingvoj

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Historio

La judoj estis forpelitaj de Hispanio la 31-an de julio de 1492, pro ordono de la Edikto de Granado kiu establis la devigon por ĉiuj judoj forlasi la hispanan teritorion, krom tiuj kiu konvertiĝis al Kristanismo. La plimulto de la sefardoj elektis la ekzilon, kaj preskaŭ ĉiuj ili estis ricevitaj de la sultano Bajaceto la 2-a en la Osmana Imperio. Alia parto establis sin en Maroko, Nederlando kaj iuj landoj de Centra Eŭropo.

La sefardoj establitaj en la Osmana Imperio apartenis al socia kaj ekonomia tavolo ĝenerale supera al tiu de la otomanaj loĝantoj, kio permesis al ili konservi la lingvon kaj la plimulton de siaj hispanaj tradicioj dum preskaŭ 400 jaroj. Io simila okazis en Maroko, tamen, la tempo favoris ke ili estigis du versiojn de la sefarda hispana, la *Ladino* (parolita en la Balkanoj) kaj la Haketio de Maroko. Pro la kultura influo kiun havis la ladina versio, kaj sendube, pro la nombro de parolantoj kiujn ĝi havis, multe pli granda ol tiu de la haketio, la unua estas konsiderata lingva tre interesa por filologoj kaj hispanistoj.

Komparo kun aliaj lingvoj

Judhispane

> El djudeo-espanyol, djudio, djudezmo o ladino es la lingua favlada por los sefardim, djudios ekspulsados de la Espanya enel 1492. Es una lingua derivada del espanyol i favlada por 150.000 personas en komunitas en Israel, la Turkia, antika Yugoslavia, la Gresia, el Maruekos, Mayorka, las Amerikas, entre munchos otros.

Hispane

> El judeo-español, *djudio*, *djudezmo* o ladino es la lengua hablada por los sefardíes, judíos expulsados de España en 1492. Es una lengua derivada del español y hablada por 150.000 personas en comunidades en Israel, Turquía, la antigua Yugoslavia, Grecia, Marruecos, Mallorca, las Américas, entre muchos otros.

Esperante

> La jud-hispana, *djudio*, *djudezmo* aŭ *ladino* estas la lingvo parolata de la sefardoj, judoj forpelitaj de Hispanio en 1492. Ĝi estas lingvo derivata de la hispana kaj parolata de 150.000 personoj en komunumoj en Israelo, Turkio, la malnova Jugoslavio, Grekio, Maroko, Majorko, Ameriko, inter multaj aliaj.

Katalune

> El judeuespanyol, *djudio*, *djudezmo* o ladí és la llengua parlada pels sefardís, jueus expulsats d'Espanya el 1492. És una llengua derivada de l'espanyol i parlada per 150.000 persones en comunitats a Israel, Turquia, l'antiga Iugoslàvia, Grècia, el Marroc, Mallorca, les Amèriques, entre molts d'altres.

Asture

> El xudeoespañol, *djudio*, *djudezmo* o ladino ye la llingua falada polos sefardinos, xudíos expulsados d'España en 1492. Ye una llingua derivada del español y falada por 150.000 persones en comunidaes n'Israel, Turquía, na antigua Yugoslavia, Grecia, Marruecos, Mayorca, nes Améríques, entre munchos otros.

Galege

> O xudeu-español, *djudio*, *djudezmo* ou ladino é a lingua falada polos sefardís, xudeus expulsados de España en 1492. É unha lingua derivada do castelán e falada por 150.000 persoas en comunidades en Israel, en Turquía, na antiga Iugoslavia, Grecia, Marrocos, Mallorca, nas Américas, entre moitos outros.

Portugale

>

> O judeu-espanhol, *djudio*, *djudezmo* ou ladino é a língua falada pelos sefarditas, judeus expulsos da Espanha em 1492. É uma língua derivada do espanhol e falada por 150.000 pessoas em comunidades em Israel, na Turquia, na antiga Iugoslávia, Grécia, Marrocos, Maiorca, nas Américas, entre muitos outros.

Vidu ankaŭ

- Fortuna
- Jida lingvo
- Judismo

Eksteraj ligiloj

- Parolanto de Ladino en Wikitongues (kun Esperanta subteksto ŝaltebla) (https://www.youtube.com/watch?v=xMaydZp_J30)
- Autoridad nasionala del Ladino (http://www.aki-yerushalayim.co.il/anl/) (Israela aŭtoritato de la judhispana lingvo)
- Klarigo de la uzado de la hebrea alefbeto (http://www.mishkan.com/ladinoalefbet.html)
- Vortaro en pluraj lingvoj (http://lingua.cc.sophia.ac.jp/diksionario-LK/index_search.php?)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Judhispana_lingvo&oldid=6633068"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:45, 4 jun. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.